

# La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №7



## Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №7 (297)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

**Aperas** ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

**Eldonas kaj administras:** Halina Gorecka

**Redaktas:** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj:** Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

**Poŝta adreso:** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Retpoŝtaj adresoj:** sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

**Retejoj:** <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

**Perantoj.** Vidu la liston sur p. 69-70.

### Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

### Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj:** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

**Recenzoj:** Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

**Represo:** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2019, №7 (297).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 июля 2019 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i> .....	2
En ĉi tiu numero .....	3
<b>Ronda Tablo</b> .....	<b>5</b>
Ronda Tablo pri la Esperanta literaturo (Gerrit Berveling, Jorge Camacho, Edwin de Kock, Miguel Fernández, Sten Johansson, Julian Modest, Suso Moinhos, Nicola Ruggiero, Giorgio Silfer, Anita Stecay, Spomenka Štimec) .....	6
<b>Kulturo</b> .....	<b>13</b>
Jorge Camacho: Esperanto restos nobla kaj nenoca hobia (Intervjuo de Paweł Fischer-Kotowski) .....	14
Jorge Camacho. en la ŝedo; mrt; Potencialoj; Palestino; La landlimo .....	17
Anna Löwenstein. La memoraĵoj de Julia Agripina (Romanfragmento) .....	19
Julian Modest. Dancanta anĝelo .....	23
Trevor Steele. Olda Johano memoras .....	27
Spomenka Štimec. Bastardo (Dua ĉapitro) .....	30
<i>Literatura Foiro</i> , 2019, №299 .....	33
Aleksander Korĵenkov. Aperis nova eldono de <i>Baza Literatura Krestomatia</i> ....	34
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> , 2018 №32, 33 .....	36
Ricevitaj gazetoj .....	37
Probal Daŝgupto. Rerigardi nin tra 'Norma Prismo' (Recenzo: Gorecka H., Korĵenkov A. <i>Nia Diligenta Kolegaro</i> ) .....	38
<b>Eventoj</b> .....	<b>44</b>
Mark Fettes. Du demisioj kaj tri laborreduktoj en Roterdamo .....	45
Peter Baláž. Polyglot Gathering 2019 – la plej granda kaj riĉenhava .....	46
Ulrich Brandenburg. Neumünster: En la Unesko-jaro de indiĝenaj lingvoj ....	48
Ihor Glagolevsjkij. En la ĉefurbo de Ukrainio.....	49
Bill Harris. Nordamerikanoj kongresis en Bostono .....	50
Peter Baláž. Slovakio: Prelegoj, ekskursoj, elektoj .....	51
Thierry Spanjaard. INOE: Vivi en naturo senveste .....	53
Hong Sungcho. IERM: Meditadi en Esperanto .....	54
Juan Carlos Montero Medina. 40 jarojn konstruante pontojn .....	56
Abengo. Monata kunveno en Tajvano.....	56
UEA kongresos en Belfasto en 2021.....	57
Komitatanoj B elektitaj por la periodo 2019-2022 .....	58

La Azia-Oceania Komisiono de UEA renovigis sin .....	58
Peter Baláž. SES kaj SEP – samtempe kaj samloke .....	59
Koncize .....	60
Nekrologe .....	60
<b>Arkivo .....</b>	<b>61</b>
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en julio 2019 .....	62
Alen Kris. Moko de l' fato .....	63
Kiel aboni <i>La Ondo</i> .....	69
Reklamo .....	71

Duafoje en ĉi tiu jaro ni proponas teman numeron: la marta *Ondo* estis dediĉita al lingvoj, kaj en la fokuso de la julia estas literaturo. Vi povas konatiĝi kun la opinioj de niaj verkistoj, konsentintaj kunveni ĉe nia virtuala “ronda tablo” kaj kun nia speciala gasto Jorge Camacho. Liaj poemoj kaj kelkaj noveloj kaj romanfragmentoj de aliaj aŭtoroj estas en nia beletra “menuo”, espereble bongusta.

Kvankam pro la abundo de literaturo ĉi-foje mankas la sekcioj “Tribuno” kaj “Mozaiko”, la primovada sekcio “Eventoj” ne povis manki, kaj en ĝi vi povas legi pri la aktivado de la senlaca slovaka samideano Peter Baláž, kiu kun helpo de siaj amikoj kaj kolegoj ĉi-jare organizis kaj organizos plurajn diverstemajn aranĝojn. Inter ili estas ankaŭ la tradicia Poliglota Renkontiĝo, foto el kiu ornamas la kovropaĝon.

La sekva *Ondo* estos duobla kun multaj informoj pri esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj, okazintaj en julio kaj aŭgusto. Ĝi aperos la 2an de septembro.

**Agrablan Kongresan Sezonon!**

## Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>



# Ronda Tablo



Kvankam la samtabloj ankoraŭ ne legis la respondojn unuj de la aliaj, en unu demando regas principa konsento. Ne temas pri granda malkovraĵo, sed iom malĝoja konstato de plimulto el niaj respondintoj: tio, kio ĉefe mankas al nia literaturo, estas manko de legantoj. Kiel ni povus kontraŭagi tion? (La supra foto de Jozef Baláž montras la kongresan libroservon en Nitra, 2016)

# Ronda Tablo pri la Esperanta literaturo

En novembro 1986 en la speciala literatura numero de la revuo *Esperanto* Vilmos Benczik demandis al deko da literaturistoj, kion ili opinias pri la bonfarto de la Esperanta literaturo. En tiu antaŭjubilea etoso regis sobra optimismo kaj fido pri la estonteco. Preskaŭ 33 jarojn poste *La Ondo de Esperanto* decidis ripeti la tri demandojn kaj kompletigi ilin per du pliaj. Dum tiu periodo Esperantujo ŝanĝiĝis finfine ne malpli ol la mondo ĝenerale. Krom tri el tiamaj respondintoj – Edwin de Kock, Giorgio Silfer kaj Spomenka Štimatec – ĉe nia Ronda Tablo kunsidas nun ok aliaj verkistoj kiuj debutis poste.

Kvankam la samtabloj ankoraŭ ne legis la respondojn unuj de la aliaj, en unu demando regas principa konsento. Ne temas pri granda malkovraĵo, sed iom malĝoja konstato de plimulto el niaj respondintoj: tio, kio ĉefe mankas al nia literaturo, estas manko de legantoj. Kiel ni povus kontraŭagi tion?

## Jen niaj demandoj:

1. Kion vi verkas nun?
2. Kion vi taksas la ĉefa atingajo de la Esperanta literaturo post la centjariĝo de Esperanto?
3. Kio laŭ vi nuntempe pleje mankas al la Esperanta literaturo?
4. Kion vi pensas pri nia literatura kritiko?
5. Kiun Esperanto-libron vi laste legis? Kiel ĝi impresis vin?

## Gerrit Berveling

1. Post fino de ĵusa librego 400-paĝa *La Apostolaj Patroj* [tradukoj el la Greka de tekstoj rande de tiutempe estiĝanta *Nova Testamento*] mi nun okupiĝas pri tradukado de fasko da verkoj de Lukiano el la Greka kaj tradukado de frukristanaj *Atestaĵoj pri Martiroj* el la Greka kaj el la Latina kaj libro da *Apokrifaj Evangelioj* same el la Greka. Mi faras intertempe planojn por mia tria originala romaneto.

2. Ke ĝi simple plu ekzistas kaj daŭre plu kreskas. Mi pleje ĝojas pri la ĵusa apero de *La konflikto de la epokoj* de Edwin de Kock.

3. Amasa legantaro.
4. Ke fine ĝi **vere** maturiĝu!
5. *Orm la Ruĝa* – kvazaŭ porjunula libro treege bone verkita – stile tre plaĉa. Mi tuj daŭrigos legadon per *Orm la Ruĝa*, dua volumo.



## Jorge Camacho

1. En la hispana, poemojn. En Esperanto, ĉefe recenzojn.
2. Du librojn de Baldur Ragnarsson: *La lingvo serena kaj Momentoj kaj meditoj*. Nemaĵhaveblaj.
3. Legantoj (kaj klientoj de libroservoj).
4. Malfacilas trovi kapablajn, kompetentajn recenzistojn ekster la rondo de la kutimaj kvin aŭ ses. Mi miras ke homoj kiel Valentin Melnikov, Carlo Minnaja aŭ Fernando Pita aŭdacas publikigi siajn “recenzojn”.



5. Aparte de *Beletra Almanako*, la lasta estis *Septembre, surstrate en Tokio. Granda Tertremo en la regiono Kantô 1923 – Postsono de Masakro*, de Naoki Katô en traduko de Midori Mamija. Ĝi tiom impresis min, ke mi tuj verkis recenzon legeblan en la retejo Goodreads kaj publikigotan en BA.

## Edwin de Kock

1. Mi ĵus finis mian epopeon, *La Konflikto de la Epokoj*, de preskaŭ 400 paĝoj, plus Aŭtora Enkonduko, Notoj kaj Glosaro. Iomete pli ol triono de ĝi jam aperis kiel parto de mia *Testamento: Plena Originala Poemaro* (2015). Mi kun bedaŭro opiniis, ke ĝi restos nefinita. Sed poeto-frato Baldur Ragnarsson min kuraĝigis kompletigi ĝin. Mi tuj komencis la taskegon, kaj ekde tiu jaro elfaris la reston, la plej grandan parton. La tuton eldonis la Flandra Esperanto-Ligo kun solida bindo kaj bela ilustrita superkovrilo plurkolora. Jam 89-jara, mi estas la lasta postvivinto de la generacio debutinta inter 1952 kaj 1961, kiu inkludis William Auld, Marjorie Boulton kaj Baldur Ragnarsson. Kun ili ĉiuj mi multe interrilatiĝis.



2. Aldoniĝas ĉiam pli da originala poezio bonkvalita. Unu el la plej gravaj verkoj ĉi-periodaj estas la *Poemo de Utnoa* (1993, 2018, kun revizioj), de Abel Montagut. Tiu epopeo plus la mia ambaŭ aperis post la centjariĝo. Antaŭ ĝi la ĉefverko kompreneble estis eposo, *La Infana Raso*, de William Auld. Ĉiun el tiuj tri libroj karakterizas elemento fantascienco kun klopodo sondi la signifon de la homa ekzisto. Tio min tre ĝojigas, ke tiujn verkojn de kaj Auld kaj Montagut oni jam tradukis en aliajn lingvojn. Espereble iam sekvos alilingvigoj de ankaŭ la mia.

3. Plia diskonigo en nacilingvaj rondojn per la eldono de tradukoj de nia plej bona poezio. De tio mi havas kolekton kiun transdonis al mi William Auld. Ĉu iu deziras tion transpreni por eldoni ĝin? Espereble ankaŭ aliuloj jam havas tiun tekston. Alie ĝi verŝajne pereos en mia komputilo kiam mi forpasos.

4. Multo de ĝi troviĝas en recenzoj, kiuj laŭkvalite tre varias. Precipe valoraj estas la diverstempaj taksoj de la karmemora Baldur Ragnarsson. Ili estas republikigitaj en *La Lingvo Serena* (2007), lia plena originala verkaro. Gravaj kritikeroj

eniris ankaŭ la imponajn verkojn de Geoffrey Sutton, *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto, 1887-2007* (2008) en la Angla, kaj la *Historio de la esperanta literaturo* (2015) de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer. Sed ĉi tiu temo estas tro vasta por pritrakto mia. Mi ĉiam estis kaj ĝisfine restas, por nia literaturo, precipe poeto originala.

5. Tio estas ĝuste *La Lingvo Serena* de Baldur, homo al mi speciale kara, kiu mortis antaŭ kelkaj monatoj. Krom elstara poeto, li postrestas per siaj ideoj, menso tre valora.

## Miguel Fernández

1. Ĉefe poemojn, sed ankaŭ eseojn, tradukojn de gravaj verkoj de la hispana literaturo kaj artikolojn por gazetoj.

2. La ĉefa literatura atingo post la centjariĝo de Esperanto estas la fakto, ke la Esperanto-beletro ankoraŭ ne mortis malgraŭ ĉiaj malgraŭoj. Cetere, kvankam tre malmultajn, ĝi produktis kelkajn verkojn, por kies traĝuado valorus la penon lerni Esperanton. Miaopinie, la plej grava el ili estas *Poemo de Utnoa* de Abel Montagut, impona epopeo surbaze de antikva mito nuntempigita per oportuna kaj trafa sciencfikcia prezentado. Ĝi ricevis tradukojn en la katalunan kaj en la hispanan kaj laŭdatajn publikigojn de ili. Kiom da produktoj de la originala Esperanto-literaturo spertis tian sukceson ekster Esperantujo?

3. Unue, nuntempeco. Ĉefe en poezio. Se vere la Belartaj Konkursoj de UEA, de kies gvida skipo mi estas la prezidanto, spegulas la staton kaj la pulson de nia nuntempa literaturo, atentindas la plendoj de la juĝkomisionanoj en la branĉo poezio pri la kutima deknaŭjarcenteco de la priaj konkursaĵoj. Ĝis tioma grado, ke, ĉi-kaŭze, en 2018 ili deklaris nealjuĝitaj la tri unuajn premiojn.

Due, pli da legantoj.

Trie, pli da almenaŭ duonprofesie kompetentaj eldonejoj kaj efikaj reklam- kaj distribu-sistemoj.

4. Kun nur kelkaj respektindaj esceptoj, diletanteco regas. Hontindas kaj oftas legi vort-abundegajn kritikojn dirantajn absolute nenion pri la medolo de verko aŭ evidentigantajn, ke la kritikanto – malofte, vere kompetenta kritikisto – absolute nenion komprenis pri ĝi; legi ditirambojn pri elplumaĵoj kun gimnaziana nivelo kaj skurĝajn vortojn, multfoje eĉ pro eksterliteraturaj kialoj, kontraŭ vere interesaj aŭ altnivelaj beletraĵoj; legi recenzojn kun indikoj pri nur eraroj, aŭ neologismoj, aŭ vortuzoj ne ŝatataj de la recenzanto, dum li nenion diras pri la literaturaj valoroj de la recenzataĵo...

5. La poemaron *Laminarioj*, de Suso Moinhos. Temas pri altfluga poezio, kun anima profundeco kaj korpa nuntempeco samfrekvenca kiel la poezio produktata en la naciaj literaturoj.





## Sten Johansson

1. Ĉi-momente nenion. Antaŭ nelonge mi finverkis romanon *Ne eblas aplaŭdi unumane*, kiu baldaŭ aperos ĉe *Mondial*. Fakte, mi ja havas nebulan ideon pri nova romano, sed mi ne certas ĉu kaj kiam mi eklaboros pri ĝi, des malpli, ĉu mi sukcesos finfari ĝin.

2. Mi ne scias, ĉu temas pri atingoj, sed mi ĝojas pro la (tre malfrua) eldono de la verkoj de Ivan Ŝirjaev, precipe la romano *Sen titolo* (1995), kaj pro la romanoj de Mikaelo Bronŝtejn pri rusa/soveta/esperanta historio, plej grave kaj ĵuse *Mi stelojn jungis al revado* (2016).

3. Moderna realisma prozo, iel lokita en la realon kaj koncernanta la realan vivon de nuntempaj homoj.

4. Ĝi estas amatora kaj amatoreca, sed tiaj ja estas plejparte ankaŭ la verkado, tradukado kaj eldonado, do ne mirinde. Pli ĝene estas ke ĝi ŝajne pli kaj pli maloftas kaj malfruas, aŭ eĉ plene mankas, parte pro la mortiĝado de gazetoj, sed supozeble ankaŭ pro la malkreskanta prestiĝo de literaturo.

5. *Recenze* de Gonçalo Neves (2018). Sprita, studinda, pripensinda.



## Julian Modest

1. Verŝajne mi estas unu el la malmultaj Esperantaj verkistoj, kiu dediĉis sin ĉefe al verkado de originalaj noveloj en Esperanto. La novelo estas mia ŝatata literatura formo kaj nun mi daŭrigas verki Esperantajn novelojn, kiuj konstante aperas en diversaj Esperanto-revuoj kaj en diversaj retpaĝoj.

2. Laŭ mi la ĉefa atingaĝo de la Esperanta literaturo post la centjariĝo de Esperanto estas la libro *Historio de la esperanta literaturo* de Giorgio Silfer kaj prof. Carlo Minnaja, eldonita en 2015.

3. Laŭ mi nuntempe nenio mankas en la Esperanta literaturo, ĉar ĝi evoluas kiel ĉiuj naciaj literaturoj. En ĝi estas romanoj, novelaroj, poemaroj, tradukaĵoj el diversaj lingvoj... Estas diversaj aŭtoroj, kiuj riĉigas ĝin per siaj originalaj stiloj, pensmanieroj kaj mondperceptoj.




**Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Kulturo



**Jorge Camacho, unu el la plej brilaj (laŭ kelkaj, la plej brila) Esperantaj poetoj de la 21a jarcento, respondas al la demandoj de Paweł Fischer-Kotowski pri verkado, poezio, *Beletra Almanako*, Esperanto, Akademio, Civito, Bonalingvismo kaj aliaj temoj. (La foto montras la poeton en Finnlando, 2015)**

# Jorge Camacho: Esperanto restos nobla kaj nenoca hobia

## Kial vi ekverkis en Esperanto?

Kun kelkaj negravaj esceptoj hispanlingvaj, mi ekverkis en Esperanto kiam mi komencis verki entute, kiel adoleskanto. Kredeble la lingvo mem helpis al tio. Oni povas alproprigi al si Esperanton preskaŭ kiel lingvon gepatran, ĉefe junulo en gimnazia aĝo (iasence Zamenhof mem estis la unua ekzemplo de tio).

## Vi verkas ankaŭ en la hispana. Kiel diferencas esti poeto Esperanta kaj hispana? Kio malsamas en la verkado, en la publikigado, en la publika percepto de la verkoj?

De la lastaj du-tri jaroj mi verkas preskaŭ ekskluzive en la hispana (la libromarkato, la publiko de Esperantujo tro etas por pliaj titoloj mianomaj). En Esperantujo tre facilas iĝi konata verkisto, eldonigi librojn, havi almenaŭ plurajn legantojn en malsamaj kaj disaj landoj, dum en la hispana en Hispanujo eldonado (eĉ de poemaroj) estas industrio, kun troabundo de verkistoj kaj kun eldonejoj malemaj ricevi manuskriptojn. Cetere, multajn poemojn mi verkis du-lingve, paralele en la hispana kaj Esperanto, kaj eĉ kiam mi verkas en nur unu el la du lingvoj la poemo restas relative facile tradukebla, do koncerne verkadon mi ne sentas grandan diferencon... krom tio ke manko de unueca literatura lingvo pli klare sentblas en Esperanto (kie ĉiu verkisto kultivas propran varianton) ol en la hispana.

## Kiam kaj kiel vi verkas? Ĉu vi havas ritojn aŭ kutimojn? Ĉu, ekzemple, vi verkas tuj post vekiĝo aŭ antaŭ endormiĝo, ĉu en kafejo aŭ ĉe la propra labortablo?

Kiam kaj kie ajn. Antaŭe mi kutimis skribi notojn, versojn aŭ tutajn poemojn sur paperpecoj aŭ kajeretoj, nun mi uzas tiucele la notapon de mia aptelefono, ofte verkante rekte per ĝi. Mi ne kutimas postprilabori miajn poemojn, la unuan version mi emas rigardi definitiva, krom en okazo de nepra bezono korekti aŭ modifi. Ĉiel ajn al mi pli gravas unuavice poezio mem ol verkado de poezio konkrete en Esperanto.

**Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Poemoj de Jorge Camacho

## en la ŝedo

sekrete,  
en ŝedo de la cerbo,  
trezor' da klingoj  
– hakiloj, lancoj, sagoj

en ŝedo de l' animo,  
prete,  
la venen'  
de latentaj vortoj, agoj.

[el *La silika hakilo*, 2011]

## mrt

vanuos la vokaloj  
kaj, el la longa vorto,  
restos plue  
konsonantoj,  
minerala subskribo de la morto.

[el *En la profundo*, 2013]

## Potencialoj

Ni povus entrepreni rekreon de l' socio,  
kapitalism-abolon, eraon novan lanĉi.  
Mi povus fine verki romanon, aŭ vojaĝi  
al Andoj, al Saharo, al Arkto, Antarktio.

Ni povus jam aĉeti dometon ĉe la maro,  
sur kampo aŭ sur monto por kiam, emerite,  
la zeŭsoj nin premias aŭ punos laŭmerite.  
Mi povus renaskiĝi komence de la jaro.



*Ni povus ĝui kune, libere, frukte uzi  
elanon, energion kaj emojn. Oni povus  
akuŝi justan mondon en kiu homoj trovas  
tempon por (reciproke?) sin ami kaj amuzi.*

*Mi povus kaj ni povus... Sed ĉio estas farso.  
Super la horizonto, ete, tremruĝe, Marso.*

*[el Strangaj spikoj, 2016]*

## **Palestino**

*Ju pli altas kaj longas  
la betona murego prizona,  
des profundu kaj longu  
tunel' liberдона.*

*[el Palestino strangolata, 2016]*

## **La landlimo**

*Estas du kontraŭaj manieroj  
loĝi la landlimon:  
vidi ĝin kiel muron kiu ŝirmas  
de monstroj kaj barbaroj,  
aŭ vivi ĝin kiel zonon trapasatan  
en ĉiuj direktoj  
de gentoj, bestoj, varoj,  
aromoj, gustoj, koloroj,  
vizioj, ideoj, lingvoj...*

*[el Brulvunde, 2017]*





## ***La memoraĵoj de Julia Agripina*** **de Anna Löwenstein**

En la romano *La memoraĵoj de Julia Agripina*, kiun Anna Löwenstein nun finverkas, temas pri Agripina – inteligenta, politike lerta, kaj ambicia. Kiel membro de la plej eminenta familio en Romo, ŝi havas ĉiujn kvalitojn necesajn por sukcesa kariero en la politika vivo. Estas nur unu malhelpo – ŝi estas virino.

Romo, 25 pK

La kameon oni ekspoziciis nur en specialaj okazoj. Kutime oni tenis ĝin en pezega ligna kesto fortikigita de nititaj feraj platoj kaj ŝraŭbita al la planko. La ŝlosilo estis kaŝita en sekreta niĉo en la muro.

Ĉi-vespere la patrino de Pina atendis gastojn. Pina rigardis dum Zosimo, ilia intendanto, enmetis la ok-dentan ŝlosilon en la seruron. Uzante ambaŭ manojn,

li turnis ĝin unu, du, tri, kvar fojojn, kaj kun ĉiu turno aŭdiĝis la klakego de klinkoj, kiuj ŝoviĝas al sia loko. Tiam li levis la kovrilon, kiu malgraŭ sia pezo svingiĝis glate supren sen eĉa grinco. Pina kaj ŝiaj du pli junaj fratinoj proksimiĝis por rigardi internen, dum ilia frato Boĉjo iom flankeniĝis. Li ne intencis interpuŝiĝi kun aro da malgrandaj knabinoj.

La kesto estis plena preskaŭ ĝisrande je seĝaĵeroj, el kiuj elstaris la pintoj de ledaj sakoj kaj koloraj tuko. Pina ricevis impreson de poto da spelta stufaĵo, kun pecoj de karotoj aŭ poreoj, kiuj flosis sub la surfaco. Pina abomenis speltan stufaĵon, sed Eklogo ĉiam insistis, ke ŝi manĝu ĝin. “Ĉu vi supozas, ke via panjo permesis al si tian elektemon, kiam ŝi restis en la tendaro kun via patro? Tial la soldatoj respektis ŝin. Ŝi ne plendadis kiel ia delikata sinjorino, postulante la propran kuiriston kaj apartajn manĝaĵojn.”

La intendanto paŝis malantaŭen por observi la sklavon, kiu genuis apud la kesto kaj pasigis siajn manojn tra la seĝaĵa stufaĵo por eltiri ledajn saketojn kaj objektojn vinditajn en pluraj tavoloj da tuko. Zosimo persone malvolvis ilin, kaj zorge lokis ilin sur tableton, kie la gastoj povos admiri ilin, kiam ili alvenos. Estis diversaj maloftaj kaj valoraj objektoj: vazoj el agato kaj kalcedono, statuo de Venuso skulptita el unusola sukkena bloko, kaj stranga malgranda statueto, kiun la patro de la infanoj iam reportis el Oriento. Ĝi montris ŝvelforman dancistinon kun nenature mallarĝa talio, vestitan nur per amaso da kolĉenoj, brakringoj kaj maleolringoj, kaj kun mamoj same rondaj kaj malmolaj kiel du pomoj.

“Jen la smeralda kolĉeno de panjo!” Sila diris. “Ĉu mi rajtas provi ĝin, mi petas, panjo?”

“Kie estas la kameo?” diris Livila. “Jen, tie mi vidas ĝin, ĉu ne?” Ŝi volis plonĝigi sian brakon en la seĝaĵaron, sed Zosimo kaptis ŝin apenaŭ ĝustatempe. “Zorge, mia fraŭlineto. Ne skuu lian kubuton.”

La sklavo denove kirlis la stufaĵon kaj kaptis ledan sakon kun ruĝaj tirfadenoj. “Ha, jen ĝi”, diris Zosimo. Li prenis la sakon de la sklavo, kaj la tri knabinoj rigardis dum li pene malplektis la nodon kaj malligis la fadenojn. Finfine li eltiris larĝan platan volvaĵon.

“Jen la kameo!” diris Livila. “Mi volas vidi!”

“Ankoraŭ ne!” ilia patrino diris. “Nun, donu al li spacon – kaj ne tuŝu.”

Zorge, pacience, Zosimo malvolvis la tukojn, unu tavolon post alia. Pina kaj ŝiaj fratinoj ĉirkaŭis lin, apenaŭ spirante ĝis la lasta tavolo estis for kaj la kameo malkaŝiĝis. Zosimo prenis unu el la forĵetitaj tuko kaj uzis ĝin por poluri la kameon antaŭ ol transdoni ĝin per respektoplena gesto al sia mastrino.

**Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa julia Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Dancanta anĝelo*

**de Julian Modest**



Dana dancis de la infanaĝo. Aŭdante muzikon, ŝi tuj ekstaris, faris kelkajn paŝojn kaj komencis danci, kvazaŭ iu ekstertera fantazia forto gvidis ŝin. Ŝia maldika korpo fleksiĝis kiel flamo, ŝiaj teneraj kruroj ne tuŝis la teron, ŝiaj brakoj tremis kiel flugiloj, ŝia longa hararo similis al ondoj, ŝiaj grandaj okuloj radiis miraklan fajron. Mirinda sorĉa forto estis en la dancado de Dana! Kiam iu rigardis ŝin danci, li aŭ ŝi estis ravita, kaj ili senmove gapis ŝin. Dana dancis, kaj ŝajne leĝera vento lulis ŝiajn belegajn krurojn, ŝiajn blankajn femurojn, ŝian tutan korpon, kiu kvazaŭ ne havis karnon. Ŝi estis kiel miraĝo. La muziko flugigis ŝin tenere kiel aŭtunan folion, falantan de arbo. La dancoj de Dana estis ventegaj kaj pasiaj kiel feno aŭ facilmovaj kaj leĝeraj kiel sopiro. Ĉiu ŝia paŝo, ĉiu ŝia movo estis melodio kaj poezio kiel lirlo.

Tre juna estis Dana, kiam ŝi forlasis la naskiĝdomon kaj ekiris serĉi sian feliĉon. Unue ŝi estis en la cirko "Areno", kie ŝi dancis dum la paŭzoj inter la cirkaj programeroj.

En la cirko hindo dresis serpentojn, li ludis flute kaj el skatolo eliris serpentoj, kiuj dancis laŭ la fluta melodio. Kune kun la serpentoj dancis Dana, kaj oni ne povis diri, kio pli impresis la publikon: ĉu la serpentoj aŭ Dana. La korpo de Dana fleksiĝis kiel kano, kaj la flamoj en ŝiaj okuloj allogis la spektantojn.

La cirko kaj Dana veturis tra la tuta lando. Ili estis en urboj kaj vilaĝoj. La vivo de Dana similis al senfina ĝoja danco. Ŝi dancis tage kaj nokte. Oni diris, ke ŝiaj mirindaj dancoj sorĉis ne nur la homojn, sed ankaŭ la bestojn. Kiam ŝi dancis, la tigroj en la kaĝoj, kvietiĝis kiel hejmaj katoj. La simioj dancis kun ŝi, imitante ŝiajn movojn.

Ĉiuj en la cirko, de ĝia posedanto, sinjoro Piero, ĝis la laboristoj sur la maneĝo, amis Danan. Ŝi estis ne nur la plej juna en la cirko, sed ankaŭ la plej gaja, kaj ĉiuj diris, ke Dana feliĉigas ilin. Dank' al ŝi kaj al ŝiaj dancoj la publiko ĉiam plenigis la cirkon. Neniam antaŭe la cirkaj spektakloj estis tiel sukcesaj.

Post du jaroj Dana forlasis la cirkon. Neniu komprenis kio igis ŝin foriri. Povas esti, ke la maro allogis ŝin, ĉar tiam la cirko rondvojaĝis tra ĉemaraj urboj. Certe la senlima blua maro, la varma ora sablo, la susuro de la ondoj igis Danan resti ĉe la maro, aŭ eble ŝi renkontis iun, kiu sorĉis ŝian koron, kaj Dana enamiĝis. Iun nokton Dana silente iris el la mikrobuso, kie ŝi dormis, kaj malaperis.

Post iom da tempo oni vidis ŝin en montara vilaĝo, kie ŝi dancis sur karbardaĵo.



En iuj montaraj vilaĝoj en la lando estas tia rito. Junulinoj dancas nudpiede sur karbardaĵo. La fremdlandanoj, kiuj spektis tiujn ĉi dancojn, opinias, ke tio estas ia trompo aŭ ĵonglado. Dana tamen dancis sur la karbardaĵo kaj ĉiuj rigardis ŝin trance. Ja ŝi similis al idolpastrino, kiu plenumas dian riton. Vestita en longa blanka robo, kun la nigra hararo, kiu falas sur ŝiajn ŝultrojn kiel ondoj, kaj rigardo, direktita al la steloj, Dana similis al flamanta kometo sur la nokta ĉielo. Sub ŝiaj nudaj blankaj piedoj fajris la fajro de la revoj, sopiroj, amo kaj sorĉado.

Foje dum la dancado sur la karbardaĵo vidis ŝin Roko kaj Miko, junuloj, kiuj laboris en la hotelo de sinjoro Alozo, la plej riĉa persono en la urbo Burgo.

– Nia ĉefo baldaŭ havos naskiĝtagan feston, kaj tiu ĉi dancistino devos danci dum la festo. Por la ĉefo ŝi estos granda donaco kaj agrabla surprizo.

Kiam la danco finiĝis, ili kaptis Danan kaj enigis ŝin en nigran aŭton. Ŝi ne povis kontraŭstari. Oni veturigis ŝin en la hotelon “Maraj Lirloj” kaj fermis ŝin en ĉambron. Dana sidiĝis sur la liton sen kompreni, kial ili venigis ŝin ĉi tien, kaj kio okazos al ŝi. Sola, konsternita, Dana ekploris. Ja, ŝi ĉiam dancis, ridis, sed nun ŝi amare ploris, ĉar ŝi estis kiel najtingalo en kaĝo. Por ŝi tio estis terura.

La pordo estis ŝlosita, sola en la ĉambro, Dana sufokiĝis, malgraŭ tio ke la ĉambro estis vasta, lukse meblita kun televidilo, fridujo, grandega lito. En la banĉambro la bankuvo similis al baseno. Dana staris antaŭ la spegulo kaj ne kredis, ke ŝi vidas sin kun la longa nigra hararo, kun la vizaĝo, kiu brilis kiel kupro kaj kun la profundaj okuloj. Dana rigardis sin kaj miris. Ĝis nun ŝi malofte rigardis sin en spegulo, kaj ŝi ne kredis, ke ŝia rigardo estas tiel forta. Ŝi similis al nimfo. Pro la enuo Dana provis danci, sed ne eblis danci en kaĝo. Ŝia koro estis premita kiel la koro de timigita pasero, ŝiaj brakoj estis kvazaŭ forhakitaj, kaj ŝiaj kruroj – najlitaj al la planko. Dana eĉ ne povis movi sin. Ŝi opiniis, ke ŝi estas paralizita. Pli forte ŝi ekploris, kaj ŝiaj varmaj larmoj fluis kiel riveretoj.

Dum la tuta nokto Dana ne dormis, kvankam la lito estis komforta, mola kaj odoris je floroj.

La sekvan tagon venis ambaŭ fortaj junuloj. Ili kondukis ŝin al la restoracio de la hotelo, kiu estis plenplena da homoj, ĉefe gejunuloj, elegante, mode vestitaj, kiuj manĝis, trinkis kaj amuziĝis. En la centro de la restoracio estis podio, lumigita de forta lumo. Tie unu post la alia ekstaris gekantistoj, kiuj kantis. Junulino kun longa ruĝa robo, sen manikoj, anoncis:

– Por vi, kara sinjoro Alozo, okaze de via naskiĝtaga festo, estos granda surprizo. Dancos vera nimfo.

**Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Olda Johano memoras*

**de Trevor Steele**



Vidu, ĝenas min, ke ĉe ĉiu vizito aŭ telefonvoko miaj gefiloj, genepoj kaj pragenepoj tuj demandas, “Kiel vi fartas?” Kaj tio ne estas kutima sensignifa vortbalono; ĝin sekvas “Ĉu vi glutas viajn medikamentojn?”, “Ĉu vi kontrolis vian sangopremon?”, “Viro naŭdektrijara devas esti tre singarda...” Eĉ Zilda, mia edzino, ankoraŭ okdekkvinjara junulino, daŭre memorigas min pri tiaj bagateloj. Estis ŝi, kiu insistis, ke ni loĝu ĉi tie en granda urbo: “Ni devas esti proksimaj al kuracistoj kaj hospitaloj, kara...” Karcerulo en milionhoma koncentrejo, mi tre ofte pensas pri Rozvalo.

Rozvalo tute ne havis hospitalon, nek kuraciston. En Rozvalo la malsanaj pensiuloj ne ĝenis siajn kunvilaĝanojn, ili simple dece mortis sen granda umado. Bedaŭrinde mi estas la lasta vivanta ano de mia iama lerneja klaso, kio nur pliigas mian nostalgion pri la hejma vilaĝo.

Aĥ jes, Rozvalo! Tie, kie mi unue vidis la lumon de la suno kaj flaris la odoron de sovaĝaj floroj. La rivero, la ĉirkaŭaj montoj kaj arbaroj estis fontoj de senfina esplorĝojo. Kiom da homoj loĝis tie? Nu, se oni aldonis kelkajn bienistojn el la regiono, eble 400. Manpleno da ili estis enmigrintoj. Foje mi aŭdis iun “veran rozvalanon” grumbli pri la “fremduloj”, sed estis ĝenerale agnoskate, ke la plenkreskaj enmigrintoj estas tre laboremaj kaj amikemaj. Kiam mi estis puberulo, mi subite konstatis, ke la filinoj de la enmigrintoj estas fakte pli belaj ol niaj “propraj”.

Rozvalo estis por ni universo kompleta. Nia propra rivereto trafluis la vilaĝan centron, kaj dum inundoj estis ekscita sperto stari sur la ĉefa ponto meze de la butikumejo kaj ĝui la spektaklon de pretersagantaj arbotrunkoj portataj de la ŝvelinta, milde muĝanta bruna akvoamaso. Kiam ne estis inundo, ni knaboj kompreneble pasigis multajn somerajn tagojn naĝante en la rivero. Knabinoj ne estis invitataj, kaj ĝenerale ili obeis la nesribitan leĝon (Anastazja, la sola, kiu malobeis, impertinente sin prezentis kaj kunnaĝis; multaj knaboj sekrete enamiĝis al ŝi, sed kompreneble ne konfesis tion).

Rozvalo havis sian propran futbalteamon, kiu malofte gajnis, sed ni fanatike apogis ĝin, kaj la unu-du venkoj en ĉiu sezono estis ĝoje celebrataj. Inter pliaĝaj vilaĝanoj speco de surgazona keglado estis populara (oni flustris, ke parto de la

alogo estas, ke tie oni povas trinki bieron, eĉ kiam la drinkejo estas fermita). Pleje skandala estis la golfklubo. Onidire estis kelkfoje jare “miksduopa ludo”: geedzoj konkursis por gajni pokalon. Sed la vera “premio” venis postevente: en la salono de la klubo oni okazigis “ŝlosilludon”. La viroj staris en cirklo: la virinoj ĵetis sian domŝlosilon en la mezon de la cirklo, kaj ĉiu viro alkuris por enmanigi la ŝlosilon de la virino, kun kiu li deziris dormi tiun nokton. Mi hastu aldoni, ke miaj gepatroj ne ludis golfon...

Eĉ pli fama, kaj laŭ mia memoro tute senskandala, estis la Rozvala Amatora Dramo-Societo (RADS), kiu ĉiujare okazigis iun opereton eĉ en pli grandaj vilaĝoj, kaj unu fojon ĝi ricevis inviton prezenti en la ĉefurbo, centojn da kilometroj for. Tiu ega honoro glorbatis nin ĉiujn dum almenaŭ du semajnoj. Direndas tamen, ke la viveblo de RADS dependis grandparte de kelkaj talentuloj, kiuj ne estis denaskaj rozvalanoj, sed senditoj. Unu estis policisto, aliaj estis instruistoj aŭ poŝtovicistoj dumtempe deĵorantoj ĉe ni. Inter la veraj rozvalanoj ne abundis kant- kaj aktor-talento, kaj kiam nia plej bona tenoro kaj lia edzino, tre fortvoĉa sopranulino, ricevis oficon en alia urbo, RADS kolapsis. Estis funebra etoso dum semajnoj.

Mi jam menciis la drinkejon. Mia paĉjo estis iom pruda homo, eble. Ĉiukaze li ofte kritikis la ebriulojn, kiuj “pululis” tie. (Dio mia, Paĉjo mortis antaŭ pli ol duonjarcento – ĉu tio eblas?). En aparta ĉambro en la sama domo estis bilardejo, kie viroj iom ebriaj kaj emaj forte fiparoli daŭre misfrapis la pilkojn. La sceno ne plibeliĝis per tio, ke tiuj viroj regule patrolis al apuda urinejo. Ĝis hodiaŭ mi suspektas bilardemulojn pri diboĉemo.

Sed tio ne estis la sola morala manko de tiu fama drinkejo (kiu fakte komencis sian vivon kiel hotelo). Angula ĉambro loĝigis Joĉjon kaj lian kontraŭleĝan vetper-ejon. Dupoj plenigis la ĉambron kaj vetis je ĉevaloj en malproksimaj lokoj. Ĉiu sciis, ke tia agado estas kontraŭleĝa, kaj Stefano, la ĉefpolicisto, mem ofta vetanto, devis de tempo al tempo okazigi razion. Sekve li telefonis el la policejo Joĉjon kaj avertis, ke post duonhoro li venos plenumi sian devon. Joĉjo do havis tempon por averti ĉiujn klientojn, ke ili malaperu dum horo. Stefano venis, monpunis Joĉjon je kvindek kvidoj, mem faris unu-du vetojn, kaj malaperis. Tiel la radoj de justico turniĝis.

**Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Bastardo*

## de Spomenka Štimec

Spomenka Štimec verkas *Bastardon* memore al la kroata kaj usona pentristo Maksimilijan Vanka. La unua ĉapitro aperis antaŭ kelkaj jaroj en *Beletra Almanako*.



### Dua ĉapitro

La homo, kiu prenis Maks el la kota korto de lia vartopatrino en la vilaĝo Kupljenovo kaj sidigis la knabon en la kaleŝon, estis lia avo. Tiu fajnolo kun nigra ĉapelo kaj ledaj gantoj, kiu tuŝadis sian bruston kaj ripetadis konvinke: "Ich, Großvater!"

Maks nur gapis senkomprene.

Li estis tute konfuzita, kaptita de tiu fremda homo kaj enfermita en sian novan vestaĵon en kiu ne eblis moviĝi. Iom da distro donis al li la vipo, kiun la koĉero svingis super la kapoj de la ĉevaloj. Jes, la zumanta vipo estis plej interesa dum tiu vojaĝo kaj savis lin de plorado.

La maljuna Großvater sidigis Maks post la dorso de la koĉero kaj ofte rigardis al la vizaĝo de la knabo. La etulo ne volis renkonti liajn okulojn. Li obstine rigardis al siaj genuoj kiam li sentis la tuŝon de la apuda rigardo. La avo fikse rigardis la maldikan vizaĝon.

Kien ili iras?

Aperis kastelo ĉe la fino de pople borderita aleo. La koĉero helpis al la avo mal-supreniĝi de la kaleŝo. Servistino jam malfermadis la fortikan pordon.

Maks komprenis, ke li devas atendi en la kaleŝo. Ne venis al li ideo fuĝi, liaj piedoj jam estis plumbopezaj. Li rigardis al la pordo.

Malantaŭ ĝi okazis traktado inter la estrino kaj la maljuna sinjoro, kiu sin nomis Großvater.

Maks ne vidis, ke la maljunulo elprenis el sia brusta poŝo ledan monujon kaj elprenis el ĝi dikan faskon da monbiletoj. La estrino vane klopodis malfermi la buŝon por protesti, ĉar ŝajnis al ŝi iom tro.

– Ŝi havu tion por la nuna jaro. Kaj por la posta. Kaj por la venontaj. Kaj por la



aldonaj lecionoj pri la muziko, pri pentroarto, la franca, la germana. Por la matematika kaj la teniso. Ĝi mem decidu.

Fine iu servisto venis por enkonduki Maks. Li parolis dolĉe, per la dialekto de la Maksa vilaĝo:

– Aŭdu. Ne timu. Mi estas Valentin. Havu neniun timon. Mi helpos al vi. Venu, la estrina moŝto volas koni vin.

La sinjorino prezentis sin: ŝi estas la direktorino de la privata lernejo en la kastelo, kie Maks loĝos. La avo fingre montris sekvi lin supren. Post ŝtuparo aperis la ĉambro de Maks. Li havos ĉambron? La ŝranko plena da vestoj kaj blanke tegita lito. Jam de la vorto ĉambro turniĝis lia kapo.

– Kaj kie estas la lernantoj? – kuraĝis demandi Maks kroate, timigita de la granda spaco.

– Ili venos lundon al nia privata lernejo. Ankoraŭ daŭras ferioj por ili. Vi estas la sola knabo kiu loĝas ĉe ni. Sed vi havos interesajn kolegojn.

La Großvater rigardis tra la lenso de la nekomprenata lingvo por vidi kiel la vortoj efikas al Maks.

Tiam li subite ĉirkaŭbrakis la knabon. La vizaĝo de Maks tuŝis lian ventron, kie brilis io metala, malvarma kaj tiktakatanta. Ĝi pendis de iu ĉeneto.

Servisto venis peti ilin al la tablo.

Ŝinko. Blanka pano. Butero. Forkoj kiuj brilas.

Maks metis la manojn en sian sinon kaj atendis, ke iu preparu por li la manĝon, li ne kuraĝis tuŝi ion ajn.

La maljuna homo trinkis teon kaj elprenis el la skatoleto el sia poŝo aron da rondaj blankaj piloloj.

Lavango da germanaj vortoj, mallerta ĉirkaŭbrako, kaj tiu, kiu nomis sin Großvater, adiaŭis. Tra la granda fenestro eblis vidi kiel la kaleŝo foriras.

Maks restis sola. Revenis la servisto.

– Nomu min Valentin. Mi helpos al vi. Venu, mi montros la vojon al via ĉambro, se vi jam forgesis kie ĝi estas.

Maks ŝatis la klarigojn. Lia timo degelis: Valentin parolis la hejmeccan lingvaĵon, kvazaŭ en Kupljenovo.

Kiam Maks restis sola en la eta ĉambro, li unue palpis la kusenon.


**Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Aperis nova eldono de Baza Literatura Krestomatio*

**Baza Literatura Krestomatio / Komp., red. Vilmos Benczik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Russ Williams; Antaŭpar. Aleksander Korĵenkov; Enkond. Vilmos Benczik; Biografioj: Vilmos Benczik, Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. – 4a eld., kompl. – Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2019. – 368 p.; 500 ekz.**



Antaŭ 40 jaroj en Budapeŝto aperis du krestomatioj: la unua volumo de *Krestomatio de Esperanta Literaturo. Faktoj, dataro, bibliografio* (KEL) kaj *Baza Literatura Krestomatio* (BLK). La trivoluma KEL (la dua volumo aperis en 1981, kaj la tria en 1982), kompilita de István Szerdahelyi por studentoj de la Esperanto-fako de la universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto, prezentis la unuan periodon de la Esperanta literaturo, sed ĉi tiu 500-ekzemplera krestomatio estis apenaŭ konata ekster la medioj universitata kaj literaturologia.

Sed la samtempe eldonita BLK, kompilita de Vilmos Benczik kiel kolekto de specimenoj akompane al la literaturhistoria parto de *Gvidlibro por supera ekzameno*, rapide populariĝis en Esperantujo kiel “literatura minimumo en la esperantista kultura komunumo”. La unua eldono (3500 ekz.) de BLK disvendiĝis en du jaroj, kaj en 1982 aperis la dua eldono (3000 ekz.), al kiu Benczik aldonis la biografian parton por tiuj legantoj, kiuj ne havis la menciitan *Gvidlibron*. En 1986 estis publikigita la tria eldono (2320 ekz.).

Ankaŭ la tria eldono (pli ĝuste, represo de la dua eldono) post kelkaj jaroj estis elĉerpita, sed pro la drastaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj la eldonado de Hungara Esperanto-Asocio ŝrumpis, kaj plia (re)eldono ne sekvis.

BLK de jaro al jaro iĝis ĉiam malpli aktuala, ja la plej freŝa teksto en ĝi (fragmento el *Kiuj semas plorante...* de Éva Tófalvy kaj Oldřich Kníchal) estis verkita probable en 1979, sed dum la sekvaj kvardek jaroj aperis pluraj atentindaj beletraĵoj, kiuj meritis iĝi parto de nia “literatura minimumo”. Ni kontaktiĝis kun Vilmos Benczik, kiu tre volonte permesis al ni pretigi novan eldonon de BLK, kondiĉe ke ĝi enhavu ĉion, kion li elektis, kaj postrikolton kun verkoj de novaj aŭtoroj, kiuj mankis en la tri Budapeŝtaj eldonoj.

En septembro 2018 formiĝis tripersona redakta komitato, kiu fine de la jaro kompilis liston de la aldonendaj aŭtoroj.

Nia tasko estis pli facila ol tiu de Benczik, antaŭ kiu “ne okazis provo kompili libron, kiu pretendas doni superrigardon pri la tuto de nia literaturo”. Ni povis uzi liajn elekto-principojn, kaj krome je nia dispono estis la intertempe eldonitaj literaturhistoriaj verkoj CEOLE (Sutton G. *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*. New York, 2008) kaj HEL (Minnaja C., Silfer G. *Historio de la Esperanta Literaturo*. La Chaux-de-Fonds, 2015). Ni mem elektis la verkojn de la forpasintaj aŭtoroj, kaj danke al la afabla helpemo de la vivantaj aŭtoroj ni ricevis la tekstojn, kiujn ili opiniis indaj kaj endaj por la aperigo en la kvara eldono de BLK.

“Ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu”, – tekstas la Zamenhofa proverbo. Estas klare, ke same kiel Benczik, ni ricevos ne nur laŭdojn, sed ankaŭ riproĉojn, ekzemple, pro tro malmultaj virinoj kaj ekstereŭropanoj inter la aŭtoroj, aŭ pro manko de iu(j) aŭtoro(j) kaj verko(j) en BLK. Ni volonte enmetus verkojn de afrikaninoj aŭ azianinoj, sed, same kiel por nia antaŭulo, la ĉefa kriterio por ni estis ne la sekso aŭ loĝlando de la aŭtoro, sed la literatura valoro.

Post la elektado sekvis la redaktado, kompostado, enpaĝigado, provlegado ktp. Ni redaktis kaj kompletigis la malnovajn biografietojn kaj aldonis la biografietojn de novaj aŭtoroj (la strukturo de la biografioj iom ŝanĝiĝis; nun en ĉiu biografieto post la litero **V** sekvas la ĉefaj libroformaj verkoj de la koncerna aŭtoro).

La dua kaj la tria eldonoj de BLK entenis 134 prozajn kaj poeziajn tekstojn de 59 aŭtoroj. Al ĉi tiu tekstaro ni aldonis du romanfragmentojn de Karolo Piĉ kaj Eli Urbanová, antaŭe reprezentitaj nur per poemoj. La *Postrikolton* konsistigis 63 tekstoj de 23 novaj aŭtoroj. Rezulte, la nuna eldono de BLK enhavas 199 tekstojn de 82 aŭtoroj.

Ni esperas, ke ĉi tiu krestomatiaĵo estos utila por studentoj de la Esperanta literaturo en la Interlingvistikaj Studoj ĉe la universitato Adam Mickiewicz en Poznano, kaj en esperantistaj renkontiĝoj, ekzemple NASK kaj SES, kie regule okazas kursoj pri la Esperanta literaturo.

Plej granda laŭdo kaj ĝojo por ni estos ekscii, ke iu el la novaj esperantistoj, traleginte en BLK romanfragmentojn aŭ poemojn, legos ankaŭ la plenajn romanojn aŭ poemarojn, el kiuj estas plukitaj tiuj fragmentoj aŭ poemoj.

*Baza Literatura Krestomatiaĵo* estos premiere prezentita la 8an de julio kadre de la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Paneveĵo (Litovio). Ĝi estos aĉetebla en la libroservo de UEA kaj en aliaj grandaj Esperantaj libroservoj kontraŭ 27 eŭroj (plus sendokosto). Loĝantoj de Ruslando mendu rekte ĉe nia redakcio.

Demonstra versio: La komencaj paĝoj (1-7), specimenaj paĝoj de kelkaj aŭtoroj, du biografiaj paĝoj kaj la ok lastaj paĝoj (361-368) estas libere elŝuteblaj laŭ la normo “pdf” en nia retejo: <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Blk-demo.pdf>

Agrablan legadon!

**Aleksander Korĵenkov**

Pro poŝtaj problemoj ni ricevas la *Beletran Almanakon* ne en Kaliningrado, sed en Kaŭno. Dum iom pli ol unu jaro ni ne vizitis Litovion post la prezentado de *Nia Diligenta Kolegaro* en Vilno pasintaprile. Sed komence de junio okaze de laborvizito, ligita kun reeldono de *Baza Literatura Krestomatio*, ni ricevis la 32an kaj 33an kajerojn de BA por junio kaj oktobro 2018 respektive. Ŝajnas, ke pli freŝaj eldonoj ankoraŭ ne aperis.


En mia suba prezento mi ne listigos ĉiujn aŭtorojn kaj verkojn, tion oni povas facile trovi en la almanaka retejo. Mi haltos ĉe kelkaj tekstoj, kiuj diverskiale tiris mian atenton.

Mi ĉiam tralegas la *Prezenton*, kiun verkas iu el la granda redakcia teamo; foje ĝi rilatas al la enhavo, foje tute ne. En la 32a *Boao* Jesper Lykke Jacobsen prezentas mensan eksperimenton, se “Esperanto neniam ekzistus” – amuze. Probal Daŝgupto en sia prezento de la 33a tuŝas la rilaton de esperantistoj al debato, preteco (ne)diskuti, (ne) interŝanĝi opiniojn: “Ni kiel uzantoj de Esperanto dumvive lernas la arton labori kune sed pensi propre”.

Tradukitaj prozo kaj poezio en la du almanakoj ebligas konatiĝi kun aŭtoroj nekonataj internacie, pri kiuj mi ne facile povas trovi ruslingvajn informojn.

En la 32a *Boao* mi ŝatis plurajn tekstojn. *Olivoj preskaŭ senpagaj* de la rumana verkisto Alexandru Vlad (trad. Ionel Oneț), memorigas dolore konatan situacion el la socialisma epoko, kvankam sopirantoj pri tiu tempo memoras nur, ke “pano kostis 3 leojn, kaj la olivoj estis preskaŭ senpagaj”.

Malkovro por mi estis finlande konata (kaj rekonata per premioj) Zinaida Lindé (naskiĝinta kiel Uŝakova en Leningrado). Ŝia kazo estas interesa el la lingva vidpunkto, kion ni, esperantistoj, aparte ŝatas: tradukistino el la sveda al la rusa, ŝi loĝas kun sia svedlingva edzo kaj infanoj en Finnlando, verkas svede kaj ruse. Ŝia rakonto *Konversacia rondo* (imagu tiun por Esperanto) havas kaj lingvan dimension kaj soci-politikan pro la fadeno Pollando-Ruslando. Mi jam trovis rete ŝiajn ruslingvajn verkojn, al kiuj mi revenos, kiam mi liberiĝos de provlegado. La tradukon faris la sveda finno Kalle Kniivilä.



**Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa julia Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

## Rerigardi nin tra 'Norma Prismo'


Gorecka, Halina; Korĵenkov, Aleksander. *Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj*. – Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2018. – 320 p., il.; 500 ekz. – (Serio Scio, №10).

### La prismo<sup>1</sup>

Por emfazi la diversecon de la manieroj rigardi, ni hodiaŭ kutime parolas pri *perspektivo* aŭ *optiko*, pense al vidaj precizigiloj kiel lupeo, mikroskopo, lenso. Neniu en nia epoko plu uzas la metaforon *prismo* tiucele. Tamen iam estis tute normala tiu parolfiguro. Ekzemple, la ĉi tie recenzata enciklopedio diras pri Ferenc Szilágyi (p. 275) ke en 1955 li “fondis k ĝis sia morto (1967) redaktis la kulturan, socian, literaturan revuon *Norda Prismo*”. Reeĥante la nomon de tiu revuo en sia titolo, kaj krisignante la uzon de la eksmodiĝinta vorto ‘prismo’, tiu ĉi recenza eseo celas ne revenigi tiun parolfiguron en nian aktivan ilaron, sed substreki la gravecon *rigardi la rigardon* per kiu oni aliras siajn faktojn.

Certe gravas kontroli la faktojn mem. Recenzantoj de unu speco emas rigore elspuri erarojn aŭ misetajn prezentojn. Duaspecaj kolegoj preferas komenti pri la kriterioj laŭ kiuj la kompilintoj elektis ĝuste ĉi tiun ducentopon por enciklopedia elstarigo. Tiujn elekto-kriteriojn la duaspecaj opinias la plej atentindaj elementoj de la koncepta bazo de tia verko. Sed la nuna recenza eseo iras laŭ tria vojo. Malpli gravas al mi la kriterioj determinintaj la surekranigon de specifaj homoj – aŭ eĉ la mikro-demandoj kiuj strukturis la artikolo-skemon – ol tiuj fonaj makro-demandoj kies emfazoj kaj sordinoj trakuras la tutan libron. Tiujn demandojn elektis nek la kompilintoj nek iliaj konsultitoj; ili apartenas al la kolektiva nekonscio de la nuna esperantismo. Jen tio kion mi celas per la esprimo *rigardi la rigardon*.

Vi kompreninde volos ke mi parolu pli konkrete. Certe la starpunkto kiu unuavide aspektas ‘konkreta’ estis la sola disponebla kiam mi, dekseksjaraĝa, konatiĝis kun la pinto de la konkreteco klasika, *Enciklopedio de Esperanto*, katalogante por la Nacia Biblioteko de Barato kvincent-voluman Esperanto-kolekton donacitan de Lakshmiswar Sinha. Baldaŭ mi aŭdis pri iniciato de CED kompili novan eldonon



1. Ĉi tiu recenzo aperis en *Beletra Almanako*, 2018, №32, p. 148-154. Ni dankas al la recenzinto kaj al la redakcio pro la afabla permeso represi ĝin en *La Ondo*.



de tiu *Enciklopedio*. Oni petis min fari kompileton de historiaj faktoj pri la barata movado por la planata libro. Mi turnis min al Sinha, kies abundaj konsiloj kaj fakto-livera helpo povigis min produkti ion akcepteblan al la komisiinto, Ulrich Lins. Tamen CED ne rikoltis sufiĉe da artikoloj kaj, forlasinte la enciklopedio-reeldonan projekton, uzis la jam kolektitajn materialojn por la aliformata kompendio *Esperanto en perspektivo* – kies prefaco agnoskis eĉ la kontribuetojn de ordinaraj soldatoj<sup>2</sup>. Sub idealaj kondiĉoj, la apero de tia kompendio spronus ondon de repensado pri nia sankta afero, pri la ŝanĝiĝantaj altaroj de niaj sindediĉoj; kaj jam en tiu jardeko do rezultus kolektiva transiro de pensoj tro konkretaj (pasinteco-katenitaj) al ideoj bezonkonforme abstraktaj (novigo-kapablaj). Sed vi scias kiaj estis la cirkonstancoj. Tiu referencilo fatalis aperi en la hamburga jaro 1974, cezura por la pluiro de UEA. La kompetentuloj kiuj normale emus ekzameni tiun *perspektivon* tiam havis nete aliajn prioritatojn. Pasis la momento. Ni ĉiuj perdis gravan okazon kritiki la troan konkretecon de tiu prismo per kiu Lapenna kredis povi neŭtrale analizi la disgaman kolor-diversecon de la lumturoj tra la historio de la Esperanto-movado.

Nun kiam aperis NDK, ni ja ne duafoje perdu la okazon fari tiun reekzamenon de bazaj demandoj kiun ni ŝuldas al ni jam de jardekoj. La nuna momento ja ne estas grande kaldrona; krome, helpas nin la modera kaj prudenta stilo de Korĵenkov kaj Gorecka. Ni certe agnosku ke nek plene ripariĝis la breĉoj de 1974, nek mankas skismoj novaj. Tamen NDK, diference de *Esperanto en perspektivo*, konscie klopodas disponigi bildon kiel eble plej senpartian kaj paroli vice de la tuta Esperantujo, kiom tio entute eblas. Ĉiun personon kun reliefe aparta vidpunkto oni prezentas sen aprobo aŭ anatemo kiel portanton ĝian. Kie regas notinda disopinio, oni notas ĝin.

Ambaŭ strategioj ekzempliĝas en la artikolo pri André Albault. “Post la retiriĝo el la [Akademio-]prezidanta ofico [li]<sup>3</sup> partoprenis la laboron de la asocioj AEIOU kaj TRENHA, kiuj celis krei novan help-alfabeton (NHA) por Eo” (p. 12): prezento senpasia. “Liaj studoj pri la landnomoj kaŭzis polemikon, kiu daŭras ĝis nun” (p. 12): disopinio raportata. Ĝuste tiu laŭdinda senpartieco de NDK fronte al la eksplice diverĝaj tendencoj ene de Esperantujo ebligas ke ni lanĉu de ĝi ekdiskuton pri la trakura, ĉiupartia, sed efektive draste *limiga* koloraro de la paletro mem. Nome, ke ni abstrakte, principe, estonteco-ripense ekrigardu tiun konkretan, dokumentaman rigardon per kiu Esperantujo difinas sin – rigardon prave fieran pri la atingoj de la pasinteco, sed senrimarke katenitan al la fiero *nur* pri *tiu* atingoj.

Antaŭ ol transiri al tiu nia nova tagordero, tamen, decas unue laŭdi detale la ‘norman prision’ NDK. Kvankam ĝi nenie liveras eksplican prezenton de sia strategio,

---

2. Ivo Lapenna, Ulrich Lins, Tazio Carlevaro (red.) *Esperanto en perspektivo: faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo*, London / Rotterdam: CED, 1974. Paĝo vi.

3. La sistema preterlaso de subjektaj pronomoj estas bonvena strategio, anoncita en la prefaco.

la verko klare manifestas en siaj artikoloj interesan principon rilate al la multaj demandoj kiuj dividis la pacajn batalantojn. Nome, *disecojn de pensado kaj agado registru nur se el ili aperis formale nova institucia strukturo*.

Ekzemple, konsideru la fakton ke René de Saussure “proponis novan teorion de vortfarado, kiu baziĝis sur la gramatika kategorieco de la E-radikoj (AdE akceptis ĝin nur en 1967)” (p. 248). Nek ĉe Kalocsay nek ĉe Waringhien oni notas ke ili donas netan formon al tiu teorio kaj akceptigas ĝin en 1967. Nek ĉe Szerdahelyi nek ĉe Auld ni aŭdas pri ilia opozicio al la ‘gramatika kategorieco de la E-radikoj’. Kial ĉi tiu esperantologie grava debato aŭ tiu pri la participoj ne aperas surekrane? Ĉar el tiuj debatoj ne rezultas skismo, ne disiĝas *tegmentoj* (asocioj aŭ kongresoj aŭ revuoj) kiuj formale reprezentus po unu flankon de la disopinio. Mi proponas nomi ĉi tiun strategion de NDK *tegmentisma* – reliefigi la homojn respondecajn pri la tegmentoj. Kiam mia titolo parolas pri ‘Norma Prismo’, temas pri la rolo de tegmentoj kiel savtenantoj de monde validaj *normoj* en movado kie abundas oponemuloj.

NDK kalkulas kiel tegmento-respondecajn ne nur la kovrilbildajn geheroojn (aĉetu la libron por konstati kiuj dek unu figuroj aperas tie). La artikolo pri Ernfrid Malmgren, se elekti tipan ekzemplon de la malo, rigore priskribas ties atlasan rolon, montrante ke liaj ŝultroj dum jardekoj portis plurajn el la tegmentoj. Tiu artikolo diras ke Malmgren “kun H. Seppik verkis la lernolibron *Sistema kurso de Esperanto* (1932)” – menciante Seppik inter la centoj da nomoj pri kiuj NDK ne artikolas. La kompilintoj evidente antaŭvidas ke la leganto serĉos la reton kaj konstatos la gravecon de Henrik Seppik, alia tenanto de niaj tegmentoj.

Laŭ mia lego, tegmentoj kaj normoj formas ĉe NDK triunuon kun “*neŭtrala lingva fundamento*”. Rimarku la atentigon ke Hippolyte Sebert “En la 2a UK (Ĝenevo, 1906) proponis k akceptigis rezolucion pri la neŭtraleco de UKoj” (p. 252). NDK estas nur unu laborejo kie la paro Korĵenkov-Gorecka montras sian konsekvencan sindediĉon al principa neŭtraleco. Ankaŭ en la mastrumado de *La Ondo de Esperanto* ili sisteme neŭtralas – inter rivalaj institucioj en Esperantujo; inter movadaj potenco-centroj orientaj kaj okcidentaj; inter gravaĵoj ondantaj en la globaj Nordo kaj Sudo. Korĵenkov en sia *Historio de Esperanto* eĉ skribas ke ekde 1946 “La ekdomino de Usono ŝanĝis la mondan ordon, kaj iom post iom la angla ekfariĝis la reale funkcia internacia helpingvo en diplomatio, komunikado, scienco, komerco, sporto k.s.” (p. 90). Tiu zorga vortumo – kiu pragmate koncedas la faktan hegemonion de la angla, sed navigas inter la Scilo de kapitulaca akceptego kaj la Ĥaribdo de indigna demonigo – estas realisma ĝis grado nekutima en niaj referenciloj.

**Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Eventoj

## 世界语创立日 2019



26.07.2019

学习世界语：  
[www.lernu.net](http://www.lernu.net)

关于语言：  
[www.lingvo.info](http://www.lingvo.info)

跨文化沟通：  
[www.esperanto.net](http://www.esperanto.net)  
[www.uea.org](http://www.uea.org)

土著文化  
同样需要  
沟通上的平等



世界语 — 国际语言

La 26an de julio, je la 132a naskiĝdato de Esperanto, en multaj lokoj de la mondo esperantistoj festos la “Tagon de Esperanto”, interalie, per informkampanjo helpe de porokazaj afiŝoj pretigitaj en pluraj lingvoj (supre estas la ĉina versio).

## Du demisioj kaj tri laborreduktoj en Roterdamo



**La 28an de junio la prezidanto de UEA Mark Fettes sendis al la Komitato de UEA mesaĝon, kiun ni reproduktas ĉi-sube.**

Pasis longeta tempo de kiam mi laste raportis al vi pri la situacio rilate al la laborkontraktoj en la Centra Oficejo. Vi verŝajne memoras, ke fine de marto mi skribis al vi pri nia decido ekigi proceduron por redukti la kostojn de la salajroj, kiuj kune konsistigas du trionojn de niaj elspezoj. Mi nun povas doni al vi pli da informoj pri la posta evoluo.

En la unua fazo de la proceduro, ni provis atingi libervolan interkonsenton kun la koncernaj oficistoj (entute kvin personoj). Du el ili akceptis nian oferton. En tiuj du kazoj, temis pri plena ĉesigo de la laborrilato. Sekve la sekretario, Kasia Marciniak, kaj la purigistino, Linda Silva Miranda, ne plu laboras en la CO. Ni elkore dankas ilin ambaŭ pro iliaj valoraj kontribuoj, kaj deziras al ili sukcesan plulaboron ĉe aliaj asocioj aŭ entreprenoj.

Tri aliaj oficistoj (Ionel Oneț, Ralph Schmeits, Stanka Starčević) tamen ne volis akcepti kion ni proponis, eĉ kun diversaj kompensoj, krompagoj k. s. Ĉar la atingitaj ŝparoj estis ankoraŭ nesufiĉaj, ni iris en la duan fazon de la proceduro, por kiu necesas la aprobo de la laboroficejo. Ni prezentis la argumentojn kaj ciferojn por pravigi la redukton en salajrokostoj. Kompreneble la tri oficistoj povis ankaŭ prezenti siajn kontraŭajn argumentojn. Tiu procedo daŭris kelkajn semajnojn.

La 26an de junio, post pesado de la argumentoj, la laboroficejo konkludis favore al la labordonanto, t. e. al la proponita redukto de laborhoroj pro financaj konsideroj.

Ni do antaŭeniras laŭ la plano anoncita en marto. Leteroj estas jam transdonitaj al la koncernaj oficistoj. Se ili nun akceptos la novajn kontraktojn, ili ĉiuj plulaboros ĉe UEA, kvankam malpli ol plentempe. Kompreneble ĉiu el ili rajtas ne akcepti la proponitan kontrakton kaj ekserĉi laboron aliloke. En ĉiu okazo, mi volas esprimi grandan dankon al ili pro iliaj kontribuoj al la Asocio, kaj deziri al ili sukceson kaj feliĉon, sendepende de ilia decido, ĉu resti ĉe UEA aŭ ne.

Evidente ni ne venis facile al ĉi tiu drasta paŝo. Ĝi estas tamen nepre necesa por limigi la jarajn defecitojn. La faritaj paŝoj apenaŭ rezultigos ŝparojn en ĉi tiu jaro, pro la pagado de diversaj kompensoj al la oficistoj pro la kontraktaj ŝanĝoj. Nur en la buĝeto por 2020 oni povos vidi la sekvojn de ĉi tiuj decidoj — kaj ne imagu, ke temas pri plena forigo de la defecito. Ruĝa inko plu abundos, kaj la Komitato kaj Estraro devos cerbumi pri daŭra ŝparado kaj la serĉado de novaj fontoj de enspezoj.

Kiel petite de kelkaj komitatanoj, ja venos raporto pri la financa situacio kaj la estontaj evoluoj, kun la celo subteni informitajn diskutojn kaj decidojn en Lahtio.

Kaj kiel ĉiam, mi staras je via dispono por respondi eventualajn demandojn.

**Mark Fettes**



## Polyglot Gathering 2019 – la plej granda kaj riĉenhava

La renkontiĝo Polyglot Gathering (Plurlingvula Kunveno) allogis fine de majo al Bratislavo rekordan kvanton de plurlingvemuloj. Entute 654 personoj el 67 landoj partoprenis ĝin.

Jam la sesan fojon okazis ĉi tiu evento, kaj, kio estas ĝojiga, ĉiujare ĝi allogas pli kaj pli da homoj (ĉi-jare venis je 116 homoj pli multe ol pasint-jare). Poliglotoj (plurlingvemuloj) evidente komencas malkovri sin kiel komunumon, intereso-grupon, movadon. Eĉ sen firmaj movadaj kaj organizaj strukturoj, sentebblas la emo renkontiĝadi kaj fari ion “utilan” kaj interesan por si mem kaj por aliaj poliglotoj. Tiel ja naskiĝis la Plurlingvula Kunveno, kiun efektive fondis tri esperantistoj kaj aliaj esperantistoj (ene de E@I) plu organizas ĝin.

Oni ne ŝokiĝu (estante ĝisosta esperantisto): la ĉefa komuniklingvo estas la angla! Sed... ĝi estas tie pro praktikaj kialoj – plej multaj poliglotoj nuntempe ja regas ĝin. Do por doni la gravajn anoncojn, aranĝi pagojn, sciigi pri manĝoj, programo, ekskursoj ktp oni uzas la anglan. Sed krome – ĉiuj poliglotoj venas al la renkontiĝo ĝuste por praktiki aliajn lingvojn! Ofte ili venas, ĉar ĉi tie ili trovas rarajn eblojn: a) renkonti “plurlingvemajn samideanojn”, kiuj samkiel ili ŝatas lerni diversajn (jes ja, eĉ tre ekzotikajn) lingvojn; b) aŭskulti prelegojn pri lingvo-rilataj temoj (ofte de famaj kaj prestiĝaj poliglotoj, profesoroj ktp.); c) praktiki siajn lingvojn; ĉ) pasigi tempon kune, renkonti malnovajn amikojn kaj/aŭ trovi novajn amikojn aŭ laborpartnerojn.



Jen do, estas multaj kialoj por veni al “Polyglot Gathering”! Ĝojigas la fakto, ke kutime ĉ. 20-25% da homoj parolas (ankaŭ) Esperanton! Do oni povas tie pasigian tempon tute trankvile ankaŭ uzante nian verdan lingvon.

Ĉi-jare ankaŭ okazis pluraj prelegoj aŭ pri aŭ en Esperanto, oni povis viziti Aligatorejon, Gufujon, kulinaran festivalon ktp. Eĉ la plej juna preleganto estis esperantisto: la 14-jaraĝa Petro Fedosov el Moskvo. Same (jam la sesan fojon) okazis t. n. “Lingva defio” (Language challenge) – ĉi-jare pri du malsamaj lingvoj: la hinda kaj Esperanto. (Oni devas eklerni la lingvon sesdek tagojn antaŭ la aranĝo kaj dum la evento oni faras teston, kie oni pritaksas la nivelon de la lernintoj).

“Polyglot Gathering” havas por ni esperantistoj ege interesan historion – eĉ se ankoraŭ mallongan. Kun la ideo venis esperantistoj Chuck Smith kaj Judith Meyer en Berlino en 2014, kiam simila evento (Polyglot Conference) devis okazi en Usono, kaj oni ne volis atendi ĝis 2015, kiam ĝi eble revenus al Eŭropo. Oni do decidis okazigi en Berlino novan poliglotan eventon kaj titolis ĝin “Polyglot Gathering”. La unuaj tri renkontiĝoj okazis en la ĉefurbo de Germanio.

Sed pro kio ĝuste tiu ĉi evento iĝis tiom alloga kaj ŝatata de la komunumo de plurlingvuloj? Eble tio estas granda merito de la tuta koncepto, kiun Chuck kun Judith prenis rekte de la Esperanto-eventoj kaj agordis ĝin por la plurlingvula grupo. Ili sukcese transprenis plurajn sukcesajn aferojn de Esperanto-aranĝoj kaj enprogramigis ilin al tiu ĉi evento. Evidentiĝis, ke tio estis ĝusta decido! Tiel oni dum Polyglot Gathering povas trovi Gufujon, Aligatorejon, Interkonan vesperon, Kulinaran festivalon, plurlingvan koncerton de jOmO aŭ de aliaj esperantistoj ktp. Jen do, pruvo, ke nia Esperanto-mondeto povas esti alloga ankaŭ por la cetera mondo!


Ekde 2017 la renkontiĝon ĉeforganizas E@I, kiu uzas en sia oficejo Esperanton kiel laborlingvon. Plua videbleco (kaj aŭdebleco) de Esperanto dum la aranĝo do estas garantiita. Krome ni devas alte taksi la rolon de la Esperanto-organizoj, pretaj subteni la aranĝon. Ĉi-jare UEA denove estis subtenanto (sponzoro) de la Plurlingvula Kunveno kaj tiel grave helpas videbligi Esperanton en ĝi.

Kio pri la estonteco? La aranĝo ja havas evidente kreskantan potencialon. kaj ni, kiel organizantoj, emus utiligi tion. Venontjare ĝi okazos la 26-30an de majo en Teresin, proksime de Varsovio. Ĝi okazos sub unu tegmento, laŭ la stilo de ordinarnaj Esperanto-renkontiĝoj oni kongresumos kaj tranoktos en la sama konstruaĵo (tio tamen validos nur por unuaj 300 aliĝintoj, por la sekvaj ĉ. 400 estas aranĝitaj plurnivelaj hoteloj).

**Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Arkivo



Antaŭ 100 jaroj, la 14an de julio 1919 naskiĝis Marinko Ĝivoje (1919-1982), eminenta kroata jugoslavia esperantisto, aŭtoro de pluraj bibliografiaj, enciklopediaj kaj prilingvaj verkoj. La foto montras samideanon Ĝivoje en ties hejmo en 1980. (Foto: Josip Pleadin)

# Jubileoj kaj memordatoj en julio 2019

5. Antaŭ 160 jaroj naskiĝis **Alfred Michaux** (1859-1901-1937), franca advokato, interlingvisto k e-isto; iniciatoro k vicprezidanto de la unua UK (Bulonjo-ĉe-Mar, 1905), defonda membro de LK (1905-14), redaktoro de *La Revue de l'Espéranto* (1903-1906). En 1911 li malaktiviĝis pri Eo k okupiĝis pri sia projekto Romanal (1909). — Legu pli en NDK, p. 199-200.

5. Antaŭ 170 jaroj naskiĝis **William Thomas Stead** (1849-1912), angla ĵurnalisto, filantropo, pacifisto k e-isto; li aktive disvastigis Eon en la E-rubriko de sia revuo *The Review of Reviews* k disponigis oficejon por BEA, kies vicprezidanto li estis; Stead dronis en la ŝipo "Titanic" en 1912.

12. Antaŭ 30 jaroj mortis **Miyamoto Masao** (1913-1934-1989), japana socia aganto k e-isto, la plej konata japana E-literaturisto, aŭtoro/tradukinto de pli ol 20 libroj en/pri Eo, i.a. de *Pri arto kaj morto* (novelaro, 1967), *Invit' al japanesko* (poemaro, 1971) k *Sarkasme kaj entuziasme* (esearo, 1979); kvar liaj tradukoj el la japana literaturo aperis en la libroserio "Oriento-Okcidento"; membro de AdE (1986-89), honora membro de UEA (1984). — Legu pli en NDK, p. 204-206.

14. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Marin Vjekoslav Ivan Gjiwoje** (1919-1936-1982), kroata jugoslavia ĵurnalisto k e-isto, konata en Eo kiel Marinko Ĝivoje; redaktoro de *La Suda Stelo* (1950-57), *Jugoslavia E-isto* (1957-60), *Jugoslavia Fervojisto* (1963-64), gvidanto de la gazetara servo de UK (1953-73); aŭtoro de *Kroatoserba-Ea vortaro* (1966), *Esperantonimoj* (1973), *Panoramo de Ea literaturo* (1979), *Konsultlibro pri Eaj bibliotekoj kaj muzeoj* (1980), *Leksikono de aktivaj jugoslaviaj e-istoj* (1985) k. a. — Legu pli en NDK, p. 119-120.

19. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Johannes Rijk Gerardus Isbrücker** (1889-1909-1967), konata en Eo kiel Jan Isbrucker; pioniro de uzado de Eo en radio, komitatano (1925-36) k vicprezidanto (1934-1936) de UEA, membro de LK (1921-48) k AdE (1922-67), la plej longtempa prezidanto de AdE (1937-63), aŭtoro de *La evoluo de la telefonio* (1928), *Historio kaj organizo de la E-movado* (1932), *Pri la vortfarado en Eo* (1959) k. a., honora membro de UEA (1934). — Legu pli en NDK, p. 138-139.

19. Antaŭ 140 jaroj naskiĝis **Eugène Aristide Alfred Adam** (1879-1914-1947), franca metiisto, fakinstruisto k e-isto, konata en Eo kiel Eugeno Lanti; la ĉefa figuro en la laborista E-movado, iniciatoro k gvidanto de SAT (1921-33), redaktoro de *Sennacieca Revuo* (1921-24) k *Sennaciulo* (1926-28), kreinto de sennaciismo (1931), iniciatinto de *Plena Vortaro de Eo* (1930), aŭtoro de *For la neŭtralismo!* (1922), *La laborista esperantismo* (1928), *Manifesto de la sennaciistoj* (1931), *Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?* (Kun R. Guihéneuf, 1935) k aliaj verkoj. — Legu pli en NDK, p. 166-168.

26. Antaŭ 132 jaroj (1887) en Varsovio aperis la Unua Libro de Lazarj Markoviĉ Zamenhof – la naskiĝdato de Eo.

26. Antaŭ 50 jaroj (1969) en Helsinko komenciĝis la 54a Universala Kongreso de Eo.

Aleksander Korĵenkov

# *Moko de l' fato*



## **Originala novelo de Alen Kris**

Larĝa brusto kaj forta mentono – la sekreta agento Leo Najtingal staris ĉe longa bufedo kaj ŝajnis kontempli fragmenton de la strato, kiu sin etendis post iom polvita vasta vitro de la lokalo. Damnante la sorton li silente movis la makzelon kaj arde deziris la finon de la pena spektaklo. Lia blonda peruko moleste stringis la kranion, dum ĝia plektita vosteto ĉiumomente kroĉis la kolumon de la oranĝa jako. Ŝvitaj gutoj fluis de sub la bukloj kaj minacis la buntan ŝminkon, tiam Leo tiris la manon el la poŝo de la verda pantalono por viŝi sin per granda roza tuko. Inter la torentoj de silentaj blasfemoj li rememoris sian nigran ledan mantelon, kaj en liaj farbitaj okuloj aperis humida nostalgia brilo.

– Diablo scias por kio estas tiu mistifiko, – li pensis angore, sekvante per la rigardo respektoblan nigravestan viron kun diplomata valizeto, kiu transis la straton ĉi-kontraŭe. Verdire, Leo ankaŭ bone konis la celon de sia mirakla transformo kaj, kvankam kun tremo, strikte obeis la devon de la servo. Li eĉ povis jam rimarki evidentajn rezultojn de siaj penoj: du aŭ tri bufedaj personoj flankis la dekoritan agenton kaj nur atendis momenton por engaĝi lin al konverso. Fine galanta brunulo kun konveksaj karesaj okuloj tuŝis fingre butonon de lia jako kaj prononcis per plastika baso:

– Kompano, mi ne ŝatas prefacojn. Ni iru, oni faros belan trakton.  
– Neniu bezono, civitano, – sonis postdorse subita voĉo, oni turnis la kapojn, kaj Leo mire rekonis la respektoblan viron en la nigra. Oni povas eĉ esti pli kategoria – la veninto meritis ĉian respekton. Lia glata kombo perfekte harmoniis

**Ekde 1999 ĉiuj numeroj de *La Ondo de Esperanto* estis iom post iom enretigataj; sed nur kelkaj tekstoj el la pli fruaj jaroj estas konsulteblaj tra niaj rubrikoj (ĉiuj recenzoj ĝis 2015 jam estas en nia retejo). Do, ĝis la fino de ĉi tiu jaro ni prezentos en la sekcio “Arkivo” kelkajn malnovajn tekstojn.**

kun la skrupula razo, kaj la strekoj de la pantalono estis en plena konkordo kun la rigora rekto de la streta kravato. Mezalta kaj mezaĝa, ne magra sed ankaŭ ne tro dika, li sugestis la ideon de prospero kaj administro, kaj lia valizeto signifis ion plian ol ŝafan imiton de stulta modo.

– Neniu bezono, – ĝentile ripetis la respektable individuo, – oni jam planis certan trakton, do mi petas pardonon.

Kaj li sendis signifoplenan rigardon al Leo invitante lin eksteren per apenaŭ videbla kapa gesto.

La sensa naturo de la sekreta agento tuj divenis aŭtentan aŭtoritaton.

– Ŝajne oni decidis aboli la taskon, – li pensis espere kaj bruske depuŝinte la trudan brunulon, kun preto sekvis la ĝentilhomon.

– Mi kore salutas aŭdacan batalanton por la sanaj moroj, – kun rideto ekparolis la homo en la nigro kiam ili paŝis laŭ la trotuaro de la strato de Martiroj. La mola lumo de la septembra suno klare iluminis ĉiun detalon de la ĉirkaŭo, kaj Leo rimarkis grandan grizan makulon sur basko de lia mantelo. Probable la duonobsкуро de la kafejo estis naskinta iun iluzion, ĉar nun li povis ankaŭ vidi, ke la eleganta inkognito portis ne tute blankan ĉemizon kaj havis ĉifan sulkon ĉe la genuoj.

– Ĉu oni ŝanĝis la programon? – hastis demandi la sekreta agento penante estingi ronĝan senton. – Kion do mi devas fari?

Lia blonda peruko definitive perdis ekvilibron kaj preskaŭ ŝirmis la okulojn, kaj la miksita per la tuko ŝminko provokis viglan intereson ĉe preterpasantoj. Tamen la proksime venonta liberigo de la histrionaj atributoj apogis lian toleron kaj Leo prete atendis la respondon de sia supozita kolego.

– Komence ni serĉu lokon por pli bona konatiĝo, – iom familiare diris la viro en la nigro, – probable, oni aĉetu ion por drinki, – li aldonis kun palpebrumo, kaj Leo subite rivelis ke tiu estas magra, mave razita suspekta tipo, verŝajne seksa devianto, ja kion en alia kazo li farus en tiu renkontejo de perversuloj.

– Diable! – li blasfemis silente, rememorante sian dupan senmaskiĝon kaj flustre aldonis pli fortan esprimon.

La falsa ĝentilhomon faltis la frunton kaj faris seriozan mienon.

**Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 850 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

## Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

**Argentino:** Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: [rosar@fibertel.com.ar](mailto:rosar@fibertel.com.ar).

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: [libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au).

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: [aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at).

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: [bel@esperanto.org.br](mailto:bel@esperanto.org.br).

**Britio:** EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk)

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg).

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: [Cea.polnicky@quick.cz](mailto:Cea.polnicky@quick.cz).

**Ĉinio:** Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsu, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: [agrikulturo@126.com](mailto:agrikulturo@126.com).

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: [arne-casper@email.dk](mailto:arne-casper@email.dk).

**Estonio:** Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: [ahto.siimson@esperanto.ee](mailto:ahto.siimson@esperanto.ee).

**Finnlando:** EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: [paula.niinikorpi@gmail.com](mailto:paula.niinikorpi@gmail.com).

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org).

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: [abono@esperanto-buecher.de](mailto:abono@esperanto-buecher.de).

**Hispanio:** Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hiperanto.uea@terra.com.

**Hungario:** Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

**Hungario:** Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

**Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

**Katalunio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

**Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

**Litovio:** Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

**Meksiko:** Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

**Nederlando:** Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

**Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

**Nov-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

**Pollando:** Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

**Ruslando:** Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

**Serbio:** Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

**Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa julia Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**